GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.º
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

2ª jaro Februaro 1988 Numero 7 (1)

BILBAO ARANĜOS LA 49an KONGRESON EN 1989

Jen la grava decido kiun nia Grupa Estraro adoptis definitive. Ĝi okazos en Julio, sed ankoraŭ ni ne fiksis la ĝustan daton.

Specialan alvokon ni faras al la junularo, ĉar la sukceso de nia proksima tasko multe dependas de ĝia laboro kaj de ĝiaj sugestoj.

Esperanto, kiel "lingvo de la amikeco" bezonas nun disvastigon. Oni ne devas uzi la lingvon nur por individuaj ĝuoj. Se ni deziras prepari la necesan etoson por ĝia posta enkonduko en la lernejajn kaj universitatajn studojn, ni devas propagandi ĝin kaj nepre niaj gejunuloj estas la plej bonaj elementoj por tion fari. Ĉiuj devas koni la esencajn kvalitojn de Esperanto, kaj samtempe ni estas devigataj uzi ĝin kiel eble pli ofte kaj ĉiam pli perfekte.

Kaj alian alvokon ni adresas al niaj grupanoj. La Kongreso ekmarŝis kaj la Loka Kongresa Komitato, kiu ankoraŭ ne formiĝis, bezonos vian entuziasman helpon. Estas multaj taskoj kiujn oni devas zorgi dum ĉi tiaj eventoj kaj nun vi povas elekti tiun laboron kiu pli multe kontentigos vin.

VENU ĈE NI KAJ INTERESIĜU PRI LA KONGRESAJ LABOROJ !



Afiŝo de la 27a Hispana Kongreso de Esperanto

CIUJARA GENERALA KUNVENO

Laŭ postulas niaj Asociaj Statutoj, nia Grupa Estraro alvokas vin ĉiujn partopreni nian Ordinaran Ĝeneralan Kunsidon, kiu je la 1ª kunvokigo okazos la ....., je la 7ª kaj duono ĉe nia sidejo.

Pro tio ke je tiu dato, supozeble, ne estos sufiĉe da partoprenantoj, ĝi okazos, je 2ª kunvokigo, la ĵaŭdon 10an de Marto je la 7ª kaj duono akurate, laŭ la ĉisuba tagordo:

1ª.- LEGADO KAJ APROBO, SE INDUS, DE L´AKTO PRI LA ANTAŬA ĜENERALA KUNVENO.

2ª.- SAME RILATE MEMUARON PRI LA JARO 1987a.

3ª.- SAME RILATE BILANCON PRI EN- KAJ ELSPEZOJ DUM LA JARO 1987a.

4ª.- BUĜETPROPONO POR LA JARO 1988a.

5ª.- INFORMO PRI LA RIPAROJ FARITAJ EN LA DOMO KIE SIDAS NIA GRUPO.

6ª.- INFORMO PRI LA KONGRESO EN NIA URBO DUM 1989a.

7ª.- PARTRENOVIGO DE LA NUNA ESTRARO (Vicprezidanto, Sekretario kaj la du voĉdonantoj). Prezentado de kandidatoj, ĝis la komenco de la kunveno ĉe la nuna sekretario Eduardo Larrouy.

8ª.- PROPONOJ KAJ DEMANDOJ.

PRO LA DIVERSAJ TEMOJ KIUJN NI DEVOS PRITRAKTI NI PETAS VIAN AKURATAN ĈEESTON. DANKON !

HISPANE HISPANE HISPANE HISPANE

Pedimos vuestra asistencia a la JUNTA GENERAL ORDINARIA el jueves 10 de Marzo, a las 7 h. y media.
Los temas a tratar son particularmente importantes. SED PUNTUALES !

VASKE VASKE VASKE VASKE

Batzar arrunt orokorrara zuen etortzea eskatzen dizuegu, hurrengo Ostegunean, Martxoaren 10a, arratsaldeko zazpi t´erdietan.

ZAMENHOFAJ FESTOJ

Kiel nia Grupo programis ni rememoris D-ron Zamenhof, okaze de la datreveno de lia naskiĝo dum la 15, 19 kaj 20 de pasinta Decembro, kaj speciale ni deziras reliefigi la Debaton pri la temo: Esperanto: idealo aŭ praktika celo.

Ĉi tiun kunvenon, kiu estis anoncita per la lokaj ĵurnaloj kaj radistacioj, ĉeestis proksimume 40 personoj kaj ni povis rimarki la intereson kiun la temo vekis, pro la multaj kaj diversaj opinioj kiujn oni esprimis.

La debato kondukis nin al nova temo, pri kiu ni intencas aranĝi kunvenon, kies daton ni povos anonci al vi dum la ĝenerala kunveno.

TEMO: Ĉu Esperanto stariĝos pro la forta premo de la popolamaso aŭ pro decido de altrangaj publikaj instancoj ?

Ni opinias ke la temo estas interesa.

-----oooooooo-----

CUOTAS DE 1988

Vamos a comenzar el cobro de los recibos a los socios que tengan domiciliado en Banco o Caja de Ahorros. Los que no lo hayan hecho todavía o sean habituales visitantes de nuestro Grupo, pueden recogerlo desde ahora en nuestro domicilio social.

VASKE VASKE VASKE VASKE VASKE VASKE

Banku edo Aurrezki Kutxetan kobratzea kokaturik duten bazkideei diru jasotzea hastear diegu. Oraindanik egin ez dutenek, edota Taldean sarritan bisitatzen gaituztenek, har ditzakete ordainagiria gure erakundearen batzartokian.

12a HEJS de Tendaro



12ª JUNULARA TENDARO (H.E.J.S.)

31/3 - 4/4/1988
MONISTROL DE MONTSERRAT (Barcelona


40 kilometra de la ĉefurbo kun alloga programo.

Loĝado en propaj tendoj aŭ en malmultekostaj pensionoj.

* * * * * * * * * * *

40ª Kongreso de Internacia Fervojista Federacio (I.F.E.F.)

4-11/6/1988 PERPIGNAN (Francio)



* * * * * * * *

48-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
UNUA POSTJARCENTA KONGRESO

48ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO (H.E.F.)

14 - 18/7/1988

V A L E N C I A



Ebla Sidejo de Universala Esperanto-Kongreso en 1992.

* * * * * * * * * * *

44ª INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
(T.E.J.O.)


15-22/7/1988
Z A G R E B (Jugoslavio)

Kongresa Temo: "Komunikado en la 21ª jarcento."



* * * * * * * * * * *

RENKONTIĜOJ DUM 1988 (PLI DA DETALOJ PETU AL LA GRUPO)



22ª KONFERENCO DE INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ (I.L.E.I.)
16-23/7/1988
K E R K R A D E (Nederlando)
Kongresa Temo:"Tradiciaj kaj modernaj instrukonceptoj en la instruado de Esperanto."

* * * * * * * *

73ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
(U.E.A.) 23-30|7|1988
R O T T E R D A M (Nederlando)
Kongresa temo:"Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo."

* * * * * * * * * *

56ª INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ
30/7 - 6/8/1988
V U G T (Suda Nederlando)

* * * * * * * * * * * *

61ª KONGRESO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (S. A. T.)
6-13/8/1988
CAMPOS DE JORDAO (Brazilo)
Kongresa temo: "Pozicio de la laborista Esperanto-movado fronte al la evoluo en la nuna socio."

* * * * * * * *

INTERNACIA KONFERENCO POR EVOLUO DE ESPERANTO EN IBER-AMERIKO.
30/11 - 2/12/1988
H A V A N O (Kubo)

* * * * * * *

D - ro. I V O L A P E N N A

1909 - 1987

Naskiĝis en Split (Jugoslavio). Profesoro kaj Doktoro pri juro, Universitato de Zagreb; poste Profesoro pri kompara soveta kaj orient-eŭropa juro, Universitato de Londono; Kunfondinto de Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb kaj ĝia prezidanto de 1929-41; Prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de 1937-50; ekde 1947 estrarano de UEA; 1955-64 ĝenerala sekretario de UEA; 1964-74 prezidanto de UEA; fondinto kaj ĝis 1974 Honorofica Direktoro de CED. Eleganta kaj facila preleganto kaj verkanto diverslingve.
Forpasis en Kopenhago (Danlando) la 15an de Decembro de 1987.

L I P A C E R I P O Z U !

****

JUBILEA BILANCO PRI ZAMENHOFAJ AŬ ESPERANTAJ STRATOJ, PLACOJ KAJ MONUMENTOJ EN 30/6/1987

Entute 686 titoloj en 34 landoj.

Hispanio okupas la tria loko kun 71 titoloj, post Francio kaj Brazilo.

****

ESPERANTLINGVAJ ELSENDOJ DUM LA JARO 1987

ESPERANTO EN RADIO

				Nombroj	Horoj
Aŭstrujo	Wien	(15×2=)	30 min ĉ.sem.	104	26.
Brazilo	Rio de Janeiro		15 min ĉ.sem.	52	13.
	Sorocaba		60 min ĉ.sem.	52	52.
Ĉinujo	Beijing	(30×4=)	120 min ĉ.tage	1460	730.
Hungarujo	Budapest		10 min ĉ.sem.	52	8.40
Italujo	Roma		20 min ĉ.sem.	52	17.20
	Verona	(10×2=)	20 min ĉ.sem.	104	17.20
Jugoslavio	Zagreb		15 min ĉ.sem.	52	13.
Pollando	Warszawa	(25×4 + 30×2=)	160 min ĉ. tage	2196	976.
Svislando	Bern	(10×19=)	190 min ĉ.sem.	988	164.40
Vatikano	Radiovaticana	(10+15=)	25 min ĉ.sem.	104	21.40

Entute por la jaro 1987: **5216** elsendoj per **11** stacioj dum **2040** horoj.

(pri radiostacioj, elsendhoroj kaj frekvencoj petu al la Grupo)

Humuro

KONKLUDO. Angla ĝentlemano sidas en sia klubo. Aliras lin alia klubano kaj demandas:

— Pardonon, sinjoro, ĉu vi ne emus ludi kun mi partion de ŝako?

— Ekskuzu min, sed unufoje en mia vivo mi ludis ŝakon kaj mi trovis ĝin tiom enuiga, ke mi neniam ŝakis plu.

Post kelka tempo revenas la ŝakemulo kaj diras: — Mil pardonojn, sinjoro, sed ni bezonus kvaran partneron por briĝo. Ĉu vi ne partoprenus la ludon?

— Bedaŭrinde ne. Unu fojon en mia vivo mi ludis briĝon, sed mi trovis ĝin tiom enuiga, ke mi neniam briĝis plu.

Post ne longe la ludemulo venas ankaŭ triafoje:

— Mi apenaŭ trovas vortojn, kiel peti pardonon, sed ni volus ludi kriketon kaj unu ludanto mankas. Ĉu vi ne emus kunludi?

— Ne, sinjoro. Ne koleru. Unufoje en mia vivo mi ludis kriketon, sed mi trovis ĝin tiom enuiga, ke neniam mi ludis plu. Ho, sed jen venas mia filo, li estas bonega kriketludanto, li certe kunludos. Mi ĝojas, ke mi povis vin helpi.

— Multajn dankojn, sinjoro, sed permesu ankoraŭ demandon: ĉu la juna homo estas via sola filo?


— Jes.

— Nu, mi estis certa pri tio.

(el "Hungara Vivo")







Por stimuli la studadon...

Sondramo kun bildstria rakonto por ĵus-komencintoj, kun poemoj kaj kantoj, de la eldonintoj de la sukcesa radio/kased-kurso JEN NIA MONDO.

"Lingve kaj grafike rekomendinda" – **'Esperanto'**

"Apenaŭ necesas diri, ke la teksto estas lingve perfekta. La voĉoj estas agrablaj, la prononco senriproĉa kaj la sonefektoj 'vigligaj" – **Ivo Lapenna**, en 'Horizonto'

"...la pedagogoj, same kiel la Esperanto-gelernantoj, entuziasmiĝis pri tiu por Esperanto unikaĵo" – **Claude Gacond**, en Svisa Radio

SONDRAMO EN ESPERANTO

Eldonita de **GRUPO KVIN**, *Esperanto en Radio kaj Televido*, kunlabore kun UEA, Radio Varsovio, Esperanto Teachers' Association kaj la Londona Esperanto-Klubo.

Havebla ĉe la vialanda librobudo, aŭ pere de UEA, aŭ rekte de: ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO
140 Holland Park Avenue,
London W11 4UF, Anglujo

******Eldonita kiel kontribuaĵo al la 100-jara Jubileo de Esperanto*

Prezo: nur £3.90 plus afranko

Y AHORA EN NUESTRO GRUPO POR SOLAMENTE 800 PTAS !!!